

V PASKA DIMANĈO – 28 aprilo 2013

**NOVAN ORDONON MI DONAS AL VI: KE VI AMU UNU LA ALIAN –  
Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Johano 13, 31-33a.34-35**

**Kiam Judas eliris el la vespermanĝejo, Jesuo diris: „Nun la Filo de la homo ricevas gloron de Dio; kaj ankaŭ la gloro de Dio montriĝas pere de la Filo. Se la Filo de la homo montras la gloron de Dio, ankaŭ Dio gloros Lin.**

**Infanoj, ankoraŭ mallongan tempon Mi estas kun vi. Novan ordonon Mi donas al vi: ke vi amu unu la alian. Mi amis vin, vi same amu vin reciproke.**

**Per tio ĉiuj scios, ke vi estas miaj disĉiploj: se vi havos amon unu al alia.”**

En la evangelio de Johano la ununura fojo kiam Jesuo ordonas ion al la siaj, li ordonas tion kion ne eblas ordoni: la amon. Ne eblas ordoni la amon. Oni povas ordoni al homo obei, servi, sed ne la amon.

Kaj kial Jesuo ĝuste ordonas ami? Ni vidu la kuntekston. La kunteksto estas tiu de la lasta vespermanĝo kiun Johano prezentis per la lavado de la piedoj farita de Jesuo al siaj disĉiploj. Nu, post la lavado de la piedoj al siaj disĉiploj, kaj precipe post montrado de amo ĝis la lasta perfidanta disĉiplo, Judaso, jen Jesuo lasas tiun gravan ordonon kiu estos la distingilo de la kredantoj de lia komunumo.

Ni ĝin vidu. La evangeliisto skribas ke Jesuo diras: “*Novan ordonon Mi donas al vi*” Jesuo ne diras “Mi donas al vi kroman ordonon”, tio estas

ordono kiu aldoniĝu al tiuj de la leĝaro de Moseo. En Jesuo la evangeliisto vidas la plenumon de la nova alianco. Komence de sia evangelio, en la Prologo, la evangeliisto estis skribinta *La leĝaro estis donita pere de Moseo, la graco kaj la vero* – esprimo kiu indikas la fidelan amon – *venis pere de Jesuo*.

Estas do iu nova rilato kun Dio; la homo ne plu obeas al Dio observante liajn leĝojn – tiu estis la malnova alianco – sed similas al li akceptante kaj praktikante amon similan al la lia.

Kaj estas en ĉi tiu kunteksto de la nova alianco ke kompreneblas la eldiroj de Jesuo. Se Jesuo utiligas la vorton 'ordono' ne estas ĉar ĝi estas vera ordono. La amo povas nur esti oferata, proponata, neniam ordonata. Sed tio estas ĝuste por ĝin kontraŭmeti al la ordonoj de Moseo. La ununura ordono distingilo de la komunumo de la kredantoj estas tiu ĉi. Jesuo do diras: "*Novan ordonon mi donas al vi*". La greka vorto 'nova' indikas pli bonan kvaliton, kiu superas kaj forprenas ĉion alian, ni do povus traduki "*pli bonan ordonon mi donas al vi*".

"*Ke vi amu unu la alian, kiel...*" Tiu 'kiel' ne indikas la manieron, sed la motivigon, la kialon. "*Kiel Mi amis vin*". Jesuo ne diras "kiel mi amos vin", li ne estas parolanta pri la amo pri la kompleta donaco kiun poste li manifestos per la kruco, mortante surkruce, sed li uzas la preteriton "kiel mi amis vin".

Kaj kiel Jesuo amis la siajn? Jesuo amis la siajn per la lavado de la piedoj, amo do kiu iĝas servado por la aliaj, signo kiu signifas doni dignon kaj liberon al la personoj, kaj amon kiu ne senkuraĝiĝas, respektas la alies liberon kaj respondas al la malamo per la amo, kiel Jesuo faris kun Judaso.

Tiu 'amis' do estas dusignifa: la servado, kiu igas la personojn liberaj, dignoplenaj, kaj amo kiu estas donita responde al la malamo, amo kiu ne senkuraĝiĝas.

Tiam Jesuo diras: "*Kiel mi amis vin*", kaj tiu estas la kvalito de amo, "*tiel vi same amu vin reciproke*". Je la bazo de la ununura ordono de la komunumo de Jesuo ne estas iu doktrino, sed amgesto kiu iĝas servado. Dum la doktrino disigas, la amo estas tiu kiu kunigas. Kaj poste la vortoj de Jesuo: "*Per tio*" tio estas per iu amo kiu iĝas servado kaj ne senkuraĝiĝas antaŭ neaj respondoj, "*ĉiuj scios, ke vi estas miaj disĉiploj: se vi havos amon unu al alia*."

La ununura distingilo de la kristana komunumo estas amo kiu iĝas videbla pere de la servado kaj pere de la propono, la ofero de amo ankaŭ al tiu kiu ĝin ne meritas. Jesuo do ne parolas pri blazonoj, pri vestoj, pri insignoj, pri ŝildoj. La ununura karakterizo de lia komunumo estas amo simila al la lia.